Heinrich Heine,

# [En Majo, kiam ĉiuj]

*tradukita de Manfred Retzlaff*

En Majo, kiam ĉiuj
burĝonoj malfermiĝis,
en mia koro tiam
la amo ekfloriĝis.

En Majo, kiam ĉiuj
birdetoj sin aŭdigis,
al ŝi deziron mian
sopiran mi sciigis.

*Traduko de la Germana poemo "[Im wunderschönen Monat Mai]" de* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04).*

*Arg-556-1125 (2010-09-14 15:51:15)*